

Norvega Esperantista Ligo

Jarraporto 2022

traktota dum la landa kunveno 2023

A. Ekstera informado

Amaskomunikiloj

Edvard (15) fikk jobbe på Stortinget: - Gå for det du har lyst til å gjøre selv om det høres helt umulig ut. Intervjuo kun junulo Edvard Ensrud-Skraastad en gazeto Glåmdalen 07.07.2022

Krome ne registriĝis aliaj artikoloj pri Esperanto, sed aperis pluraj mencioj pri la lingvo kaj la movado en jubileaj tekstoj aŭ nekrologoj:

- Aftenposten 01.11.2022 en nekrologo pri Marco Bau
- Aftenposten 01.05.2022 kaj same en Dagsavisen 30.04.2022 rilate al 102-aĝa Astrid Mansrud
- Stavanger Aftenblad 27.10.2022 «Den trygge opprøreren». Librorecenzo, kiu mencias ke Berge Furre iam «var en ivrig talsmann for esperanto».
- Os og Fusaposten 08.03.2022 kaj same en Sunnhordland 03.01.2022 «Ei likestillingskjempe frå Hordaland». Letero de Erna Solberg kaj aliaj pri Margit Tøsdal, kie menciĝas ke ŝi «arrangerte også Verdslingskongressen for esperanto i 1991, to år før ho døyde».
- Ryfylke 23.09.2022 «Til minne om Olav Andersen»

Interreto

Ni havas retpaĝaron kaj retpoŝtan sistemon. Ilin administras Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelie Abrahamsen. La retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Ni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL tie. Krom tio la ĝisdatigoj estis maloftaj, parte pro manko de taŭgaj novaĵoj. Ankaŭ NJE havas retpaĝojn. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

NEL havas la konton @esperantonytt ĉe *Twitter*, sed estis nenia aktivado tie dum 2022. NEL estas ankaŭ en *Facebook*, estis afiŝita tie 8 mesaĝoj en 2022.

Informbudoj/prelegoj

La klubo en Tromsø havis informbudon dum la aranĝo «Frivillighet i sentrum» en septembro.

Informado en la norvega

Esperanto-nytt (unupaĝa A4 aŭ dupaĝa A5) aperis trifoje dum la jaro. Ĝi estis dissendita retpoŝte al ĉ. 110 interesiĝantoj (107) kaj al NEL-inform. N-ro 3 estis enkrampita en *N.E-isto* n-ro 4. Ni afiŝas ĉiujn numerojn ĉe esperanto.no/e-nytt. Redaktoro estas Bård Hekland.

La broŝuro *Esperanto – det internasjonale språket* farita en 2021 troveblas en lokaj versioj tra la lando.

Informpetoj

Venis kelkaj malmultaj informpetoj dum 2022.

B. Instruado

Interretaj kursoj

NEL aranĝis du kvarfojn retajn kursojn printempe 2022, por komencantoj kaj progresantoj, unu horon semajne. Instruis Marianne Lund. Partoprenis la unuan kurson dek personoj, la duan kvin. Aŭtune ni invitis al nova reta kurso por komencantoj, sed ĝi malsukcesis pro malmulta partopreno. Kurso por progresantoj okazis dum la tuta aŭtuno kun 2-3 partoprenantoj.

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj, lernu.net kaj duolingo.com. Iuj certe lernas memstare per tiuj kursoj, sed ni ne scias kiom, ĉar nur kelkaj turnas sin al NEL aŭ loka klubo.

C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj

Landa Kongreso

La 4-an kaj 5-an de majo okazis Landa Kongreso virtuale, nur unu jaron post la antaŭa Landa Kongreso. Ĉeestis ĉ. 14 personoj.

Norvega Esperantisto

Dum 2022 eldoniĝis 5 numeroj de la membrogazeto *Norvega Esperantisto*, entute 88 paĝoj. La eldonkvanto estis 220 ekzempleroj. Redaktis Douglas Draper; enpaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelle Abrahamsen; presis Land trykkeri, Dokka.

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al kelkaj norvegaj kaj eksterlandaj pagantaj abonantoj kaj donacabonantoj; kaj ni sendis ĝin senpage al kelkaj norvegaj kaj eksterlandaj ricevantoj (inter ili estraranoj de UEA), kaj interŝanĝe al kelkaj eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Cetere ni sendis la gazeton papere kaj senpage al la najbaraj landaj asocioj kaj al tiuj de kelkaj malriĉaj landoj.

Retlistoj

La retroŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamsen tra servilo ĉe *Nettverksgruppa*. Per ĝi estas atingebaj 59 membroj (59), kaj sendiĝis 38 mesaĝoj (80).

Lokaj kluboj

Laŭstatutajn jarraportojn sendis la kluboj de Tromsø, Oslo kaj Trondheim. La klubo en Tromsø kunvenis 11 fojojn en 2022, inter ili estas sabata informado en la centro kaj komuna irado al teatro. La klubo ankaŭ havis informbudon en la urbocentro. En Trondheim oni renkontiĝis virtuale trifoje, fizike unu fojon, kaj aldone havis unu feston. La klubo en Oslo kunvenis 11-foje en Esperantonia, kutime kun kvar ĉeestantoj. En Bergeno oni renkontiĝis kvar fojojn en la urba biblioteko. La komunaj societoj de Bryne kaj Stavanger/Sandnes kunvenis neformale kelkajn fojojn.

NEL-estraraj protokoloj

La estraraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn punktojn.

Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj

Vortara projekto

Ne estis aktiveco en 2022.

Regiona kunlaboro

Kunordigite de Dana Esperanto-Asocio, NEL kunorganizis Skandinavanan Esperanto-kongreson en Oslo, Kopenhago kaj la pramŝipo inter tiuj urboj inter la 28-a kaj 30-a de majo. Prelegis Otto Prytz kaj gvidis ekskurson Bård Hekland. Partoprenis 35 personoj, sed nur tri el tiuj el Norvegio.

D. Administrado

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri arĥivado. La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto. Okazis 8 (9) retaj estraraj interkonsiliĝoj.

Herman Raner en Trondheim asistis la oficejon en Oslo pri komputilaj kaj telefonaj praktikaĵoj, zorgante pri diversaj agordoj laŭbezone.

Surbaze de la landkunvena decido, la domkomisiono kaj estraro faris ampleksan laboron por esplori la alternativojn por estonta oficejo. Tio inkluzivis pritakson de eventuala vendo aŭ longtempa forluigado de Esperantonia.

Membrostatistiko por NEL en 2022

En 2022 NEL havis 6 aliĝintajn klubojn (6).

La membronombroj estis en 2022 (2021):

Bergen	9	(9)
Bryne	5	(6)
Oslo	34	(40)
Stavanger	4	(3)
Tromsø	11	(11)
Trondheim	13	(13)
<hr/>		
Kluboj sume	76	(82)
Rektaj	28	(32)
<hr/>		
Membroj entute	104	(114)

Membroj laŭ kategorio:

<i>Klubanoj:</i>		
Ordinaraj	42	(48)
Junulaj	10	(10)
Samdomaj	7	(7)
Dumvivaj	17	(17)
<i>Rektaj:</i>		
Ordinaraj	20	(24)

Junulaj	3	(3)
Samdomaj	0	(0)
Dumvivaj	5	(5)

Ekonomio

NEL havis egan malprofiton en 2022, ĉefe ĉar la elspezoj draste altiĝis, dum la enspezoj stagnadis. La kunposedaj kostoj pri nia oficejo/kunvenejo/arĥivejo Esperantonia kreskis je preskaŭ 20% de 2021 al 2022, kaj je 65% de 2020 al 2022. Tiu kostodiferenco de 20 600 kronoj ene de du jaroj por Esperantonia, kune kun la prezo de anoncoj en Facebook por retaj kursoj (5270 kronoj) klarigas preskaŭ la tutan ordinaran malprofiton de 26 200 kronoj.

Ankaŭ en 2021 estis sufiĉe alta ordinara malprofito (15 000 kronoj). Sed tiam kompensis la profito de la akciinvestoj, kiujn NEL havas en Skagenfondene (21 000 kronoj). En 2022, ankaŭ la akcioj estis malprofitaj (1700 kronoj), kaj al la ordinara malprofito aldoniĝis la financa malprofito: 20 600 + 5 300 + 1 700 = 27 600 kronoj.

Do surpapere la ekonomia situacio de NEL aspektas sufiĉe maltrankviliga. Sed kvankam la ciferoj de la jarkalkulo ruĝas, NEL ne riskas baldaŭ bankroti. Ni jes posedas ejon (Esperantonia), kies valoro en 2022 estis taksata je ĉ. 2,5 milionoj da kronoj. La ĉi-jara malprofito de la asocio reprezentas ĉ. 1% de la valoro de Esperantonia, do malpli ol la supozebla valorokresko de la ejo dum la tuta jaro.

Pli tuja kaj praktika problemo estos jam antaŭ la somero 2023 manko de likvidaĵoj por pagi fakturojn (krom se venas neatenditaj donacoj). NEL devos vendi la akciojn de Skagenfondene por ebligi daŭrigadon de ĉiutaga funkciado. Se la ordinara malprofito ne kreskas en la venontaj jaroj, kaj post vendado de la akcioj, ni havos 7-8 jarojn por prepari alian – malpli multekostan aŭ pli enspezigan – funkciadon.

Legaco Rolf Uhlen

La legaco Uhlen havas paĝon en nia retejo www.esperanto.no.

La legaco donis du subvenciojn en 2022, sume 11 500 kr.

La kapitalo je la fino de 2022 estis 1 033 194 kr. (Netuŝebla: 713 630 kr.)

La legacan estraron konsistigis:

- Herman Ranes (prezidanto)
- Judith Parelle Abrahamsen (kasisto)
- Ulf Lunde (estrarano)
- Bård Hekland kaj Leif Arne Storset (anstataŭantoj)

Norvega Junularo Esperantista

NJE ne funkciis en 2022, tamen estis junaj aktivuloj en la movado kaj norvegaj partoprenantoj en internaciaj kunvenoj kiel IJK.

Internacia organizo

Komitatano A de UEA estas Kjell Peder Hoff.

Ĉefdelegito de UEA, Agnar Fitjar, peris informon de UEA pri **22** (25) membroj de NEL kiuj estis ankaŭ individuaj membroj de UEA en 2022, laŭ kategorioj jenaj:

Membro-Abonanto	6	(7)
Membro Baza (antaŭe kun Jarlibro aŭ kun Gvidlibro)	10	(9)
Dumviva Membro	6	(6)

Aliaj membrokategorioj:

Societo Zamenhof	1	(1)
------------------	----------	-----

Universala Kongreso

1 (6) norvegoj aliĝis al la 107-a Universala Kongreso, kiu okazis en Montrealo en Kanado komence de aŭgusto.

7 (6) norvegoj aliĝis al la 3-a Virtuala Kongreso, kiu okazis en novembro kaj estis plu parte vizitebla ĝis januaro 2023.

Kunlaboro kun ne-Esperantaj organizoj

NEL estas membro de la studasocio *Næring og samfunn* kaj membro de *FN-sambandet*.

Ĝis la landa kunveno en junio la estraron konsistigis:

- prezidanto: Bård Hekland
- vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Marianne Lund
- kasisto: Claude Rouget
- estrarano: Lars Sandbakk
- anstataŭanto 1: Vidar B. Skretting

La estraro de NEL estis post la landa kunveno en 2022:

- prezidanto: Bård Hekland
- vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Marianne Lund
- kasisto: Claude Rouget
- estrarano: Lars Sandbakk
- anstataŭanto 1: Vidar B. Skretting
- anstataŭanto 2: Alexander Harestad Kvidbergskår*

* Alexander Kvidbergskår ne partoprenis la estraran laboron.

E. Resumo

Malgraŭ la fakto, ke ankaŭ en 2022 forte influis la enlandan kaj internacian Esperanto-agadon kovim-19, la agado tra la jaro normaligis kaj iom ekfunkciis denove loka agado. Nia landa kongreso kiel planite okazis virtuale en majo, kun strategia diskuto kaj inspira prelego pri internacia projekto realigita de NEL-membro. Tamen okazis sur norvega tero fizika kongreso, la Skandinava, bedaŭrinde kun tre limigita norvega partopreno.

La plej tempokonsuma aŭtuna agado estis la esploroj pri estontaj oficejaj bezonoj, surbaze de la nuna membra kaj ekonomia statoj. Ĉu aktualos forvendi Esperantonian, kaj kiel estu tiam prizorgataj ĝiaj nunaj funkcioj? Estas farita ampleksa laboro por eltrovi la valoron de la ejo, kaj kiom kostus diversaj alternativoj. La estraro konkludis, ke ĝi dume ne rekomendas forvendon aŭ longtempan forluigadon de la ejo. Sed la diskuto, kiel ni prioritatu niajn tre limigitajn fortojn kaj rimedojn, ne finiĝis.

La 27-an de aprilo 2023

La Liga Estraro

Bård Hekland

Jardar Eggesbø Abrahamsen, Marianne Lund, Claude Rouget,

Lars Sandbakk, Vidar B. Skretting